

**Numero: 261.
Februaro: 2014.**

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



**Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet**

La estonto de ESPERANTO

Lastatempe min ne lasas trankvile, kio okazos al Esperanto post dek, kvindek aŭ cent jaroj. Ĉu ĝi ekzistos ankaŭ en la dudekdua jarcento? Aŭ estos eltrovita iu alia lingvo por la homaro.

Kompreneble mi ne scias la respondon. Mi estus geniulo, se nun mi vidus la estonton.

Nun en Hungario ĉiu deziras lerni la anglan lingvon.

La amaskomunikiloj televido, radio, interreto disvastigas senĉese: Homo lernu la anglan! Kiu ne scias ĉi tiun lingvon tiu estas perdita.

Ofte mi spertas, tiuj ĉi amaskomunikiloj krude atakas la zamenhofan lingvon dirante, ĝi estas senutila. Vane lerni ĝin. Anstataŭ tio oni proponas lerni anglan, germanan lingvojn.

Mia sopiro – eble laŭ multaj homoj, ĝi estas nur bela sonĝo – Esperanto estu la dua „gepatra lingvo” de la homaro.

Kial ĝi ne povus fariĝi tia lingvo. Ja, ĝi estas la miljara sonĝo de la homaro. Krei lingvon per kiu ĉiu homoj povas kompreni la alian.

En la mondo estas grandega ĥaoso. Pro la lingvaj miskomprenoj estas terura konfuzo. Mi ne deziras troigi, sed jam ankaŭ militoj erupciis.

Ĉu Esperanto povus solvi ĉi tiun gigantan problemon?

Laŭ geesperantistoj jes. Bedaŭrinde tion la malamikoj de Esperanto ne kredas. Eble ankaŭ ĝi estas la kaŭzo, ke ankoraŭ ĝi ne estas tuttere akceptita.

Kion fari, ke tiu ĉi nigra nebulo malaperu de super Esperantujo? Kiom belege estus, se la Internacia Lingvo helpus solvi la lingvan ĥaoston, kiu subpremas la homaron.

Tion nur neŭtrala, facile ellernebla lingvo povas solvi. Stulta afero estus, se nun oni komencus krei tian lingvon.

Kial, ja jam Esperanto ekzistas? Ni ne lasu, ke ĝi malaperu en la maro de la lingvoj. De ni dependas, kio okazos post jaroj. Do, ni ne laciĝu! Ni plu persistu kaj laboru por ke Esperanto estu ĉies lingvo, kaj ĝin lernu ankaŭ niaj gefiloj kaj genepoj.

-Redaktanto-



Profunda kavo

Iam ĉe larĝa vojo estis profunda kavo. Ambaŭflanke estis krutaj rokoj malhelpante la antaŭeniron.

Kiu fosis ĝin? Neniu sciis. La homoj nekomprenante staris tie.

Kiel pasis la tempo, tiel estis pli multe da homoj ĉe la kavo. Neniu povis iri plu.

-Kion fari nun?

-Hieraŭ ankoraŭ ne estis tie ĉi tiu ĉi kavo – rimarkis maldika viro.

-Nun kiel iri plu? – ĉagrenis junulino preskaŭ plorante. – Mi urĝe devus iri al la urbo. Min oni atendas. Bonvolu fari ion!

-Kion sinjorino? – demandis viro, kiu staris plej proksime al la kavo. – Ĝi estas tre profunda kaj granda. Oni ne povas transsalti ĝin. Ĉu vi havas proponon, kiel iri plu? Se jes, tiam bonvolu dividi tion inter ni!

-Mi estas virino. Fari ponton estas la tasko de la viroj. Se vi, viroj estas kavaliroj, tiam vi rapidas helpi al ni, virinoj.

-Onidire estas seksa egaleco – rimarkis viro apud la junulino. – Nun vi deziras, ke ni, viroj konstruu por vi ponton. Laŭ mi ankaŭ virinoj devus helpi, ke ĉi tiu kavo malaperu kaj ni povu iri plu.

-Kiel vi pensas? Hieraŭ mi aĉetis tiun ĉi novan robon. Ĝi malpurigus, se mi estus laboranta ĉe la kavo.

-Vi povas labori ankaŭ nude – ekridis muskoplana viro.

-Idioto! – venis tuj la respondo el la virina tendaro.

-Homoj, ni estu seriozaj! – ekparolis maljuna, lipharara viro. – Ni devas solvi ĉi tiun gravan problemon, ĉar ĝis la mondfino ni restus tie ĉi. Ĉu ne?

-Vi pravas – samopiniis multaj homoj. – Tio estas la demando, kia ponto estu konstruata.

-Por mi estas tute negrava, kia estos la ponto. Ĝi servu al ni trairi – malpacientiĝis okulvitra virino.

-Kara sinjorino, - diris al ŝi la maljunulo – unue ni devas pritrakti el kio estu la ponto?

-Stultaĵo, el kio estu tiu ponto – reatakis la virino. – Mi ne deziras artan konstruaĵon. Ĝi estu taŭga por iri plu sur la vojo!

Ili longe diskutadis ankoraŭ, sed ili ne trovis la solvon. Ĉiu volis alian. Ne estis interkonsento. La vespero rapide proksimiĝis.

En la homamaso estis ankaŭ malgranda infano. Unue li nur aŭskultis la diskutadon de la plenaĝuloj, sed post iom da tempo timeme li diris:

-Kial vi ne enterigas la kavon? Portu pioĉojn kaj ŝovelilojn. Dum kvaronhoro la kavo malaperos kaj ni povos iri plu.

La tieaj homoj ekridetis kaj ekkaresis la kapeton de la infano.

-Ŝasa-



DU ERAROJ

JANUARO ESTAS MONATO KONATA KIEL PLEJ LONGA OL ĈIUJ ALIAJ DEK DU, EN LA JARO KOMPREENBLE, TION DIRAS NUR DOMMASTRINOJ KAJ EMERITULOJ.

ESTAS KONATE, KE ILI ĈIAM KALKULAS KIEL ONI KUNLIGU LA KOMENCON DE LA MONATO KUN LA FINO.

KAJ ĈIO OKAZAS PRO ELSPEZOJ DUM NOVJARA FESTO, POSTE PRO KRISTNASKAJ TRADICIAJ FESTOTAGOJ, KAJ KIEL ŜAŬMON SUR TORTO SEKVAS DU GRANDAJ TRADICIAJ FESTOJ DIAANONCADO KAJ LA FAMILIA KRUCOFESTO SANKTA JOVAN.

KAJ DUM LA FESTADO HOMOJ VIZITAS SIAJN PROKSIMULOJN, EKSCIAS NOVAĴOJN, EKKONAS NOVNASKITOJN ENE DE FAMILIO KAJ LIBERTEMPE AMUZIĜAS.

MI JAM VERKIS PRI MIA BOFRATO, PETAR, KIUN ĈIUJ KONAS KIEL BONEGAN KONANTON DE FUNGOJ.

“PETAR, MI PETAS VIN, RAKONTU AL MI KIO OKAZIS DUM VIA AŬGUSTA FUNGOSERĈADO!” MI PRESKAŬ ĜENE PETIS LIN NE HALTIGANTE DE MIA IDEO KE MI ĈI-FOJE INSISTE RICEVU LA DEZIRATAN RAKONTON.

KAJ LI KOMENCIS RAKONTI....

ESTIS VARMA TAGO. EBLE, MEZO DE AŬGUSTO. EKSTERA TEMPERATURO ESTIS ALTA, DO ESTIS SUFOKE POR ENSPIRI, PRECIPE SE ONI JAM PIEDIRADIS PLI OL DU HOROJN TRAPASINTE PLI OL KVAR KILOMETROJN. NENIE MI VIDIS FUNGOJN.

MI EKSIDIĜIS SUR ŜTIPETO POR IOMETE RIPOZI MIAJN KRUROJN. ELLASIS MI, LA DORSOSAKETON ELMANE, FORGESINTE KE EN ĜI MI ENMETIS LA VITRAN BOTELON DE AKVO, FELIĈE ĜI NUR MALAKRE FALIS SUR LA GRUNDON, SED LA BOTELO RESTIS NE ROMPITA, KAJ MIA AKVO SAVITA.

MI TURNIĜIS ĈIRKAŬE SERĈANTE PER RIGARDO KIE MI TROVIĜIS. JA, VERE MI ŜOVIS MIAN NAZON AL TERO SERĈANTE FUNGOJN KAJ MI NE RIMARKIS KE MI ALPROKSIMIĜIS AL ŜTATOLIMO DE NIAJ NAJBAROJ, BULGAROJ.

MI DEVIS ESTI PLI ATENTA, ĈAR MI NE HAVAS PASPORTON ĈE MI. JA ĈIUJ SCIAS KIEL DOGANISTOJ ESTAS AKURATAJ LABORANTE ĈIEL LAŬ LEĜO. EKPENSIS MI MALSERENE.

TIAM MI EKVIDIS ĈEVALON. VIDALVIDE DE MI STARIS PAŜTANTA LA BRUNHARA ĈEVALO. KVIETE MI ALPROKSIMIĜIS AL LA ĈEVALO ESPERANTE, KE MI EKVIDOS LA MASTRON DE LA ĈEVALO.

LA MASTRO DE LA ĈEVALO KUŜIS SUR LA BELE ORNAMITA TEKSAĴO. LI TUJ LEVIĜIS KIAM LI EKVIDIS MIN.

NI FORTE BRAKUMIS UNU LA ALIAN. NOME, MI MOMENTE REKONIS LA HOMON. TIU ESTIS MIA ONKLO LOĜANTA EN LA VILAĜETO TROVIĜANTA DU KILOMETROJN DE TIE. NI RAPIDE BABILIS PRI ĈIO KAJ PRI MIA EKIRO TROVI MANĜEBLAJN FUNGOJN.

LI MANSIGNIS AL MI MONTRANTE AL LA GRANDA GRIZA ŜTONEGO APUD KIU TROVIĜIS ARBO.

“JEN, TIEN, IRU KAJ VI TROVOS LA FUNGOJN.”

MI VIDIS KE TIE VERE, TROVIĜIS KELKAJ FUNGOJ

ILI ESTAS VERE GRANDAJ FUNGOJ. -DIRIS MIA ONKLO MANPREMANTE MIAN MANON KAJ PER LA

DUA TIRANTE LA ŜNURON LIGITA ĈIRKAŬ LA ĈEVALOKOLON. LI FORIRIS FAJFANTE IUN KONATAN MELODION, SED MI JAM KONCENTRIĜIS SUR LA GRANDA ŜTONO, KIE TROVIĜIS LA FUNGOJ.

MI NE KREDIS KE MIN MIA ONKLO MOKE TROPMU. DO, MI EKPAŜIS KAJ KUREGIS AL LA GRIZA ŜTONO.

VENINTE SUR LA LOKON, MI ESTIS SURPRIZITA ĈAR TIE MI TROVIS NE NUR RIKOLTITAJN SED ANKAŬ DISĴETITAJN FUNGOJN EN LA ĈIRKAŬAĴO NE PLI OL METRON ANTAŬ MI.

JA, IU RIKOLTIS ILIN MANE. ILIAJ TRUNKOJ ESTIS ROMPITAJ, TAMEN BONASPEKTAJ. CERTE LA FUNGOJ ESTAS MANĜEBLAJ, EKPENSIS MI EKZAMENANTE ILIN EN LA MANOJ.

KIAL LA RIKOLTANTO FORĴETIS ILIN? BALDAŬ MI TROVIS LA RESPONDON.

SUR LA ARBO TROVIĜIS VESPEJO. JA, ESTAS DU MINUTOJ SUFIĈAJ POR KOMPRESI KIO OKAZOS, SE MI MALTRANKVILIGOS LA VESPEJON. ESTIS MALFRUE DECIDI KIUN DIREKTON MI EKKURU.

LA AREGO DE VESPOJ KONFUZITE DISFLUGIS, KAJ MI SALTURIS ZIGZAGE, SED ILI ZUMEGE AKOMPANIS MIN. MI SENTIS KELKAJN PIKILOJN SUR MIAJ BRAKOJ.

MIA ĈEMIZO ESTIS KUN LONGMANUOJ TAMEM LA FURIOZAJ VESPOJ DOLORE PIKADIS MIN..

FORKURANTE DE FURIOZAJ VESPOJ MI REATINGIS LA DOGANON. VIDINTE, KE MIN AKOMPANAS FURIOZIGAJ VESPOJ LA DOGANISTO LASIS MIN KAŜI EN DOGANEJO.

DUME LA ALIA DOGANISTO DIREKTIGIS ILIN AL ĴUS ROMPITA GRANDA AKVOMELONO METINTA SUR LA PENDANTAN BRANĈON SIMILE AL BIRDONESTO.

DANKANTE AL LA DOGANISTOJ KIUJ SAVIS MIN DE VESPOJ MI NE HAVIS GRANDAN TURMENTON PRO ALERGIO JE VESPOJ, SED MI DEVIS ĈI-TIE TRANOKTI, KAJ MORGAŬ VENIGI MIAN AMKON POR DONI AL MI PASPORTON, KAJ PAGI LA PUNON, ĈAR MI KONTRAŬ LEĜE TRAPASIS LA ŜTATLIMON.

“ĈIO LAŬ LEĜO!” -DIRIS MIA BOFRATO, RIDE FININTE LA RAKONTON.

“JES, SED VI FARIS DU GRANDAJN ERAROJN:

LA UNUA ESTAS, KE VI DEVIS ATENTE EKSPLORI TERENON NE ŜOVINTE LA NAZON TEREN KIEL VI FARIS. LA DUA ESTIS KE ONI NE MOVIĜU EN LA OKAZO DE VESPOATAKO” -DIRIS MI MORAL INSTRUE.

MIRIĈ JADRANKA LAŬ LA RAKONTO DE ŜIA BOFRATO PETAR.



Poezio

Okuloj allogitaj



Multfoje mi vere ne havas povon malhelpi tiun ĉi paron de okuloj ŝatantaj, vidantaj la blankon kaj la nigron de la mondo. Ili estas lampo iluminanta por tiu ĉi koro.

Kie mi trovos grandan potencon por direkti la okulojn al bonaj vidaĵoj kaj forlasi vidon mallumigantan la koron se la okuloj ŝatantaj ĉiam persvadas min?

Noemuti-Timoro, marte 2011
*Esperantigita el la poemo "Mataf asinmakat",
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes
Manhitu*

*

Kio estas kafo



Nigra akvo estanta en taso enhavas rimedon efektivan por ke viaj okuloj daŭre malfermiĝu se noktorestado al vi plaĉas.

Ne ekzistas mistero en kafo do vi ne bezonas esti surpriza. Se cigaredo riĉas je nikotino, kafo kafeinon enhavas.

Noemuti-Timoro, marte 2011
*Esperantigita el la poemo "Nbi kofi nanan",
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes
Manhitu*

Poezio

Longa dormo



Kiu ne ŝategas bonan dormon, kiam la korpo kaj la menso laciĝas kaj esperas ripozon?

Malgraŭ esti diligentaj kaj tre laboremaj, ni ankoraŭ estas homoj, ne robotoj.

Sed plurfoje ni obeas kaj sekvas intereson, kiu laciĝas la korpon kaj la menson ĉar ni ĉiam serĉas por trovi kvankam kiam ni trovas, ni perdas.

Ni trovas, ni perdas; ni trovas kaj perdas. Ni perdas, ni serĉas; ni perdas kaj serĉas. Ni donas kaj ricevas, ni donas kaj esperas ricevi. Ni ricevas, ni ĝojas; ni ĝojas ricevi.

Longa dormo: vitamino por la korpo kaj la menso por ke ili trovu povon enterpreni laboron. Sed kiam la kokoj kaj aŭgurbirdo kantas, vi lasas la liton kaj demetas litkovrilon.

Noemuti-Timoro, aprile 2011
*Esperantigita el la poemo "Tupas amnanut",
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes
Manhitu*



Por infanoj



Malnova rakonto



Ĉiu plenaĝulo iam estis infano, kvankam tion la etuloj ofte ne kredas. Laŭ ili ni plenaĝuloj ĉiam estis tiaj, eĉ ni tie naskiĝis.

Vi ne pravas, karaj infanoj. Antaŭ multaj, multaj jaroj, jardekoj ankaŭ ni estis samaĝaj, kiel vi.

Ĉu vi ne kredas tion?

Mi petas vin, legu mian rakonton kaj vi ekscios la veron. Mi ne deziras trompi aŭ misgvidi vin.

Se vi legos miajn frazojn, tiam eble vi diros mi pravas, kaj ne dubos, ke la plenaĝuloj ne estis infanoj.

Mi estis tre malbona knabeto. Mia amata panjo havis multe da zorgo pri mi, kaj eble ŝi malĝojis multe pro mi.

En iu fruprintempa posttagmezo mi iris kun mia amiko Peĉjo al la proksima rivero Zala por rigardi la akvon. Ni ofte iris tien dum nia libertempo. Somere la riverbordo estis nia ŝatata ripozejo, ĉar en la malvarmetaj ŝaŭmoj ni povis baniĝi bonege kun multaj aliaj vilaĝanaj infanoj. Ĉi loko estis por ni vera paradizo, la scenejo de nia junaĝo. Ankoraŭ nun post tiom da jaroj mi volonte rememoras al tiuj belegaj, neforgeseblaj someroj.

Sed nun, pri kio mia rakonto temas, okazis fruprintempe. Ankoraŭ estis malproksime la arda somero, la lerneja ferio. Antaŭ nelonge neĝis kaj la norda vento malvarme karesadis la surfacon de la akvo. Tamen ni iris tien, kaj ni rigardis la riveron. Certe sekrete mi jam revadis pri la sekva somero, kiam ni denove pasigos tie ĉi agrablajn horojn baniĝante.

Kien ni iris, tie estis sufiĉe granda ponto por veturiloj. Proksime al la ponto estis olda lignoboato albordigita. Jam delonge ĝi estis tie forlasita. Ĝi tuj vekis nian atenton. Vere per dika ĉenaro estis ligita al la bordo, eĉ ĉe la fino de la ĉenaro estis ankaŭ seruro por ke la boato ne estu ŝtelita.

Ni ne deziris ŝteli ĝin. Ja, ni bone sciis, tia boatumado estus tre danĝera. La akvo estis sufiĉe profunda, kaj kiel mi jam menciis frosta. Ne estus bone enfali la akvon. Sur la bordo ni estis nur duope knaboj. Neniu povintus helpi nin, se hazarde okazus akcidento.

Por ni jam estis aventuro, se ni enboatiĝas ligite al la bordo kaj iomete ni luliĝos per ĝi.

Komence ĉio ŝajnis facila kaj farebla. Ni ne vidis en ĝi danĝeron. La boato estis ĝuste ĉe la bordo kaj ĝin ligis forte dika ĉenaro.

Ni pensis, kelkajn minutojn ni pasigos en la boato, kaj poste ni elrampos sur la bordon.

Ni ne nur revadis pri ĝi, sed ni realiĝis nian planon.

Ni ensaltis la boaton kaj ĉio okazis glate. Ne estis problemo. Ni estis ene en la olda boato kaj ni ĝuis la ludadon de la granda akvo.

Certe nun vi pensas, ke la boato subakviĝis. Vere tio ne estus miraklo, ĉar ĝi estis tre maljuna kaj ŝajne foruzita.

Sed ne tio okazis. La boato bone servis sian celon liveri homojn sur la rivero Zala.

Mi ne scias kiom longe mi ludis en la boato. Kvin aŭ dek minutojn? Tio nun en mia rakonto ne estas grava. Ankaŭ la plej bona ludo iam iĝas teda kaj krom tio ni devis ekiri hejmen, ĉar jam vesperiĝis.

Peĉjo lerte elsaltis, sed mi ne sukcesis, ĉar la boato ekmovis kaj mi enfalis en la frostan akvon. Mi tute subakviĝis. Mia tuta vestaĵo estis plenplene akva kaj mi terure malvarmis. Tamen ne tio ĉi estis la plej timiga. Kion diros mia panjo, se ŝi ekvidos min en tia katastrofa stato.

Ĝis hejmo ni devis piedmarŝi almenaŭ du kilometrojn.

Ni rapidis, kiel ni povis. Mi ne scias, dum kiom da tempo ni hejmeniĝis. Mi jam tremis pro la malvarmo.

Ankaŭ mia panjo tre ektimis, sed ŝi pardonis al mi. Ne okazis skandalo, kial mi estis malbona knabo.

Do, ankaŭ vi povas vidi, karaj etaj amikoj, ankaŭ ni plenaĝuloj estis infanoj, super kies kapo la jaroj forflugis.

-Onklo Adalberto-



Ĉarmaj bildoj

Ĉarmaj bildoj

